# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (941) • 2020 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554


## DANKON

Sen konsciencriproĉo
mi rigardas la rosguton
sur la ruĝa rozburĝono,
favorata floro de mia patrino.
Dankon.

Mi aŭskultas la alaŭdan kanton,
la zumadon de l' abeloj,
la plaŭdon de l' riveretoj,
la murmuradon de la maro.
Mi skribas

leterojn, rakontojn, fabelojn,
kaj mi legas
romanojn, poemojn, eseojn.

Mi rigardas
la ridetantajn infanvizaĝojn,
kaj mi aŭskultas
la memoraĵojn de solecaj olduloj.

Sen konsciencriproĉo
mi vivas mian vivon.
Dankon.

Júlia
Sigmond

11.07.1929 —
23.03.2020



La poemo kaj ilustraĵo el la libro Dankon

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| Defio por la Eklezio | 27 |
| Ĉu vi amas min | 28 |
| La malbona administranto | 31 |
| Kelkaj bibliaj rimarkigoj | 33 |
| Apostoloj kaj iliaj atributoj | 34 |
| 7a Afrika kongreso de Esperanto | 38 |
| Dum la suno dormas | 40 |
| Tutmonda varmiĝo? | 42 |
| Antropoceno | 43 |
| Letero – La futuro dependas de ni | 44 |
| Letero – Music editions, C. Dalitz | 45 |
| Dankon Di´pro la pano | 46 |
| Nekrologo – Júlia Sigmond | 47 |
| Dankon, Di', al vi | 48 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, stranga kaj malfacila estas la nuna tempo pro la pandemio. Unu malgaja informo dum tiu ĉi tempo estis la forpaso de Júlia Sigmond kaj ŝia edzo, Sen Rodin.

Ŝajne en Svedio la reguloj ne estas same striktaj kiel ĉe la plejmulto de vi, kaj ni sufiĉe normale povas pasigi niajn tagojn. Ni ĉiuj, tamen, devas esti singardaj, responsaj kaj trovi aliajn manierojn teni la kontakton unu kun la alia. Ni esperu ke la malfacila tempo tamen enhavas ian bonon. Ni legas pri diversaj "on-line" [surretaj] agadoj kaj eblecoj ĝui teatraĵojn, koncertojn k.t.p. Mi proponas ke vi, se vi havas teknikan eblecon kaj se vi ne jam faris tion, serĉu esperantajn retpaĝarojn, ekz. Fontoj.net, kie vi inter alie trovas antaŭajn numerojn de Dia Regno (2002–). Sed antaŭ tio, vi ĝuu la nunan numeron de Dia Regno en kiu troviĝas diverstemaj kaj pensigaj artikol(et)oj.

Mi deziras al vi bonan legadon.

# Defio por la Eklezio

## Teksto por la paroĥanoj de la propra komunumo.

Philippe COUSSON, FR

La Eklezio ne ekzistas por si mem aŭ por siaj membroj. Ĝi ekzistas por tiuj, kiuj ne estas el ĝi, por tiuj, kiuj ne estas membroj, por tiuj, kiuj ne konas la evangelion de Jesuo Kristo, por tiuj, kiuj bezonas helpon, bezonas esti akompanataj, esti amataj.

Kion petas de ni niaj aŭtoritatoj por batali kontraŭ ĉi tiu epidemio, kiu minacas nin, kiu tuŝas nin, tio ne estas ĉefe por protekti nin, sed por protekti la aliajn. Iom similas al la trafikleĝo, kiu ne ekzistas por protekti la ŝoforon, sed por protekti la aliajn ŝoforojn, la aliajn homojn.

Ni estas en situacio simila al la parabolo de la bona Samariano. Estas homoj en risko ĉirkaŭ ni, homoj en bezono. Ĉu ni evitos ilin sen zorgi pri ili?

Sed la specifeco de nia situacio estas, ke nepre evitendaj estas la proksimaj kontaktoj. Kiel do helpi?

Kiel ni povas esti akceptanta Eklezio kiam nia pordo estas fermita? Kiel esti celebranta Eklezio kiam ne plu okazas celebroj? Kiel ni povas esti edifanta Eklezio kiam ni ne plu povas renkontiĝi? Kiel ni povas esti atestanta Eklezio kiam ni devas gardi nian distancon? Kiel esti servanta Eklezio kiam moviĝoj estas limigitaj? Kiel esti Eklezio ĉeestanta, kiam ĉiuj estas enfermitaj?

Ni estas informitaj pri la iniciatoj de tiuj kaj tiuj ĉi i.a. en la televido. Ĉi tiuj estas ideoj por preni. Aferoj ekzistas ankaŭ interrete. Nian imagon ni pluirigu. Ni proponu. El ĉi tiu mortminaco, ni estigu la vivon.

Pasko pasas, kiun ni eble ne povos festi ĉi-jare. Sed ni havas antaŭ ni, ekde ĉi tiu Karesmo, la devon imagi manierojn vivi kaj anonci la resurekton, la novan vivon en Jesuo Kristo. Se ni ne povas festi la amon de Dio, ni povas vivi ĝin. ☙

### Preĝo dum pandemio

Ni, kiuj estas simple ĝenataj
– memoru tiujn, kies vivo estas minacata.

Ni, kiuj ne havas riskajn faktorojn
– memoru tiujn plej vundeblajn.

Ni, kiuj havas la lukson labori hejme
– memoru tiujn, kiuj devas elekti inter konservi sian sanon aŭ pagi sian lukoston.

Ni, kiuj havas solvon por zorgi pri niaj infanoj, kiam iliaj lernejoj fermiĝas
– memoru tiujn, kiuj ne havas elekteblecojn.

Ni, kiuj devis nuligi niajn vojaĝojn
– memoru tiujn, kiuj ne havas sekuran lokon kien iri.

Ni, kiuj perdas nian marĝenan monon pro la tumulto de la ekonomia merkato
– memoru tiujn, kiuj tute ne havas marĝenon.

Ni, kiuj en kvaranteno estas hejme
– memoru tiujn, kiuj ne havas hejmon.

Dum timo atakas nian landon,
– ni elektu amon!

Dum ĉi tiu tempo, kiam ni ne povas fizike envolvi niajn brakojn unu al la alia,
– ni tamen trovu manierojn esti la amema brakumo de Dio al niaj najbaroj!

*Amen.*

# “Ĉu vi amas min?”

## Artikolo de la 29an de marto 1964

## József Farkas, hungara reformita pastoro (1914–1999)

Tradukis Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Pli multe okupiĝis la scienculoj de la eklezio, kiel dum la jarcentoj la predikantoj klarigis la paskajn versiklojn – ol tio, dum la samaj jarcentoj, kion efikis, kiujn fruktojn maturigis la paskaj versikloj en la vivo de la aŭskultantoj. Multon ni lernas, se ni esploras, kiel provis la homa intelekto klarigi la paskan miraklon. Kiel la homaro povis ekkompreni la nekompreneblan. Sed estus multe pli instrua, se ni povus kalkuli tiujn forto-efikojn, kiuj el la paskaj versikloj torentis al la vivo de la eklezio, kaj efikis novan vivon. La plej granda parto de tiuj efikoj sen postsigno malaperis antaŭ la sekvontaj generacioj, sed ankaŭ la malgranda parteto, kiu restis, pruvas kiel grandioza, sorto-turna efiko estas en tiuj ĉi versikloj.

Nun ni memoru pri tiu demando, kiun Jesuo demandis Petron: “Ĉu vi amas min?” Trifoje Li demandis tiun ĉi demandon de sia disĉiplo kiu brulis pro la honto, kaj kiam – pli kaj pli malgaje – venis la respondo: “Jes, mia Sinjoro, vi scias, ke mi amas vin”, tiam denove eksonis la grandioza versiklo, kiu sendas al servado: “Vartu miajn ŝafetojn” (Johano 21, 17). Jen kelkaj ekzemploj el la historio de la eklezio, kiun efikis tiu ĉi versiklo en la vivo de la popolo de Kristo.

Unu el la plej fruaj martiroj de la reformacio estas *Adolf Clarenbach*. Kiam oni komencis persekuti lin pro la evangelio, en lia preĝo li preskaŭ aŭdis la vorton de Kristo: “Ĉu vi amas min?”

Adolf Clarenbach (ĉ. 1497–1529), bruligita ĉe la kastelo en Kolonjo, mortis kiel unu el la unuaj protestantaj martiroj de la Reformacio en la Malalta Rejno en Germanio.

Post 1523 Clarenbach, instruisto, celis disvastigi la principojn de la reformacio, pro kio li estis eksigita de sia posteno. En 1525 li estis forpelita el Osnabrück, Büderich kaj Elberfeld, pro lia malferma aliĝo al la instruoj de Martin Luther. En 1528 Clarenbach estis malliberigita kaj internigita dum 18 monatoj. La religiaj aŭtoritatoj kondamnis Clarenbach al morto, por esti bruligita en 1529 ĉe la palaco ekster Kolonjo.

La lastaj vortoj de Clarenbach estis raportitaj jene: ”Kaj mortiginte min, vi ankoraŭ ne havos vian volon, sed mi havos eternan vivon. Do eĉ ĉi tiu morto ne timigas min, ĉar mi scias, ke Kristo venkis la morton, la diablon kaj la inferon.” Li laŭdire kriis ĉi tiujn vortojn al la juĝisto antaŭ esti kondukita en la pajlan kabanon, kiu servis kiel la ekzekutfajro.



Memora ŝtono al Adolf Clarenbach

“Jes, mia Sinjoro” – li respondis. “Tiam vi estu preta, ke ankaŭ vian vivon vi devos doni por mi”. En 1529 en Köln pro la juĝdecido de la katolika eklezio oni lin vivante bruligis sur ŝtiparo.


En la 19a jarcento vivis en Svislando *Henri Dunant*. Dum lia silenta pensado ankaŭ li aŭdis la vorton de Kristo: ”Ĉu vi amas min?” Post la jesa respondo tiel daŭrigis la ĉiela voĉo: “Tiel vi ne rajtas vidi pasive kiel dekmiloj mortas sur la batalkampo”. “Sed mia Sinjoro – demandis la viro – ĉu mi havas kapablon bari, ke tiuj stultuloj mortigu unu la alian?” “Ne – respondis al li la glorplena Kristo –, sed vi povas bandaĝigi iliajn vundojn”. Tiel Henri Dunant fariĝis fondanto de la internacia movado Ruĝa Kruco. Pro lia sinofera laboro oni persekutis lin, prizonigis lin, kalumniis lin, akuzis lin esti kunlaboranto de la kontraŭuloj. Sed kiam li mortis, jam flirtis la ruĝa-kruca-flago, kaj ekde tiam nekalkuleble multajn vunditojn ili savis.

Lia samtempulo estis *Friedrich von Bodelschwingh*, en kies animo la sama versiklo sonoris. Kaj kiam li pruvis, ke li amas Jesuon, tiel daŭrigis la interna

Jean-Henri DUNANT (1828 – 1910) estis svisa komercisto kaj kristana humanisto. Dum komerca vojaĝo li dum junio 1859 spektis la malhomajn kondiĉojn de la soldatoj de Piemonto-Sardinio kaj Francio unuflanke kaj Aŭstrio-Hungario aliflanke post la batalo ĉe la itala urbo Solferino: ke soldatoj mortis dum la batalo, ŝajnis malhoma, sed dum milito ne-evitebla fakto, sed ke ili agonie mortis poste batalkampe, ĉar neniu povis medicine prizorgi kaj flegi ilin, ŝajnis al li evitebla malhomaĵo. Pri siaj memoraĵoj li skribis libron kun la titolo "Memoro pri Solferino".

En Ĝenevo fondiĝis la "Internacia Komitato de Helpaj Societoj por Flegado de Vunditoj", kiu ekde 1876 nomiĝas "Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco" (IKRK). La Ĝeneva Konvencio ellaborita dum 1864 grandparte baziĝas laŭ proponoj el la libro de Dunant. Dunant, kiu dum 1901 kune kun Frédéric Passy ricevis la unuan Nobel-Premion pri Paco, do estas rigard-ata kiel la fondanto de la Internacia Movado de Ruĝa Kruco (kiel simbolo kristana) kaj Ruĝa Krescento (kiel simbolo islama).





Friedrich von BODELSCHWINGH (1877–1946) estis germana teologo. Lia patro, samnoma estis la fondinto de multaj bonfaraj fondusoj por la senhavuloj, inter alie Von Bodelschwingh Bethel Institucio, kiu provizis sanon kaj aliajn servojn al senhavuloj dum multaj jaroj.

Bodelschwingh zorgis pri heredaj difektoj kaj handikapoj, kaj espri-mis fortan malkomforton pri la kreskanta nombro de handikapuloj en Germanio. En Bethel, el la proksimume 3.000 loĝantoj / pacientoj, 1.700 estis perforte steriligitaj, agado kontraŭ kiu von Bodelschwingh havis neniujn opiniojn. Tamen li klare rifuzis eŭtanazion.


Bodelschwingh ĵuris fidelecon al Adolf Hitler en 1938. Gestapo fermis la Bethelan Lernejon de Teologio per forto en marto 1939. La pacientoj antaŭe prizorgitaj de Bodelschwingh estis senditaj al aliaj institucioj. Bodelschwingh profunde maltrankviliĝis kiam li trovis plurajn konsternajn raportojn pri mortoj de siaj iamaj pacientoj senditaj al aliaj institucioj kaj strangajn nekrologojn pri ĉi tiuj pacientoj. Ili estis falintaj viktimo de la nazia kaŝa programo por mortigado de pacientoj de diversaj kategorioj, precipe intelekte malkapablaj.

Post la milito, von Bodelschwingh starigis instituton por helpi trovi mankantajn familianojn.

voĉo: "Tiam zorgu pri la mizeruloj, zorgu pri tiuj, kiujn ĉiuj ignoras!" Kaj konstruiĝis "Bethel", la urbo de la graca amo, kie miloj de epilepsiuloj kaj aliaj malsanuloj trovas ankaŭ hodiaŭ hejmon, laboron, panon, fratecan amon kaj vivantan versiklon.

Unu el la plej elstaraj membroj de nia generacio estas *Albert Schweitzer* – ankaŭ li renkontiĝis iam en la profundeco de sia animo kun tiu ĉi versiklo. Post kiam li "science" prilaboris la historion de Jesuo Kristo, sonoris al li tute persone tiu ĉi vorto. Kaj kiam ankaŭ li jese respondis al la demando, la vivanta Kristo sendis lin al Afriko, al kuracista servo, al la prirabitaj kaj malestimitaj nigruloj.

Tiaj okazoj – kaj estas senfine longa la listo – pruvas plejmulte, ke Jesuo Kristo reviviĝis, vivas kaj indulge regas por la bono de la tuta homaro. En la tago de Pasko ni ne aŭdu denove nur la demandon, kaj ne respondu nur nian propran, feliĉan jeson – ni klopodu ekkompreni ankaŭ tion, al kiu servo nin sendas nia reviviĝanta, glorplena Sinjoro!



Albert SCHWEITZER (1875–1965) estis germana teologo, orgenisto, misiisto kaj kuracisto. La plurtalenta Schweitzer unue laboris en Strasburgo kiel protestanta pastro kaj estis unu el la gvidantoj en ekzegezo de la Nova Testamento komence de la 20a jarcento. Kiel muzikisto Albert Schweitzer majstre orgenludis la verkojn de Johann Sebastian Bach. Li estis verkinta biografion pri Bach kaj kelkajn verkojn pri religia filozofio, kiam li en la jaro 1905 decidis studi medicinon por povi realigi sian grandan deziron, helpi al homoj, kiuj plej urĝe bezonas helpon. Sian studadon li finis en 1913.

Post sia magistriĝo pri tropika medicino li translokiĝis al Lambaréné, en la ekvatora franca Afriko, nuna Gabono, kiel misia medicinisto, tie establante hospitalon precipe per siaj propraj rimedoj. Dum la unua monda milito li estis translokita kiel prizonulo al Francio, ĉar li estis germana civitano. Tie li pretigis kaj publikigis la du volumojn de la "Filozofio de la civilizo" (1923): por li la dekadenco de la moderna civilizo estas kaŭzata de manko de etiko de amo kiu devus etendiĝi al ĉiuj vivformoj.

Lia aktiveco ŝatis la laboron de la volontuloj, sed de ili li postulis ekstreme rigoran disciplinon por malkuraĝigi la "romantikemulojn", al kiuj abundas entuziasmo sed mankas la postulitaj psikologiaj dotoj.

Post la Dua Mondmilito li avertis la homaron pri la danĝeroj de la atombomboj.

Pro sia sinoferema engaĝiĝo li en la jaro 1952 gajnis la Nobel-Premion pri Paco.

Rim.: en DR 4/2009 kun la titolo "Ami kaj agi fidante" troviĝas artikolo pri Albert Schweitzer de Endre Dudich. /Red.

# La malbona administranto

Publikigita en Evangeliaj Kajeroj, numero 2, 1987

Gerrit BERVELING, NL

Legante en la Biblio, mi ne trovas tie multajn tekstojn por subteni la modernan koncepton, ke ni homoj estas la administrantoj, nome de Dio, pri Lia mondo. Eble, laŭ kelkaj, mi ne serĉas bone. Persone, mi timas, ke tiuj, kiuj ja trovas tiajn tekstojn (eĉ klarajn!), iom eninterpretas la tekstojn por eltrovi sian propran opinion.

## Unu ekzemplo

Foje mi legis varman pledon por la kristana tasko, savi la ekologion. En si mem: tute konsentite: Ja temas pri io vere serioza kaj ankaŭ en nia rilato al Dio, kiel al Kreanto, estas religie grava demando. Sed la teksto, kiun la aŭtoro verve citis, ne multe signifas ĉi-rilate.

La koncerna cito estis: 1 Petro 4:10. Sed, atenta legado de la kunteksto tuj evidentigas, ke ne temas pri nia homa tasko rilate al la konservado aŭ la (mal)-polucio aŭ la (bona/justa) ekspluato de la kreitaro kiel tia. Prefere ni komprenu la tekston, kiel rilatantan al la intern-eklezia vivo: do amplekso multe pli limigita!

Ĉu tio implicu, ke sekve ni kristanoj tute ne parolu pri la grandaj nuntempaj problemoj pri la pluvivado, la polucio, la elĉerpiĝo de krudaj materialoj, ktp.? – Kompreneble ne!

Sed ni sincere diru, ke kiel kredantoj je Dio, ni kuraĝas paroli pri aferoj kiuj nin tuŝas; kaj ni ne kaŝu nin malkuraĝe malantaŭ bibliocitoj pruvantaj nenion. Paroli elde sia fido je Dio oni ja ankaŭ povas ne citante la Biblion.

## La malbona administranto

Pri tiu homo (hom-tipo?) ni ja povas legi en Luko 16:1-13. Temas pri parabolo tradicie konata kiel tre ĝene komplika.

Enhave ĝi rakontas pri grandbienulo, kies administranto estis denuncita al li pro trompo. Li disipas la posedaĵon de l'mastro. Maldungo nepre sekvos. Sed li tion ne kviete atendas, sed ruze faras siajn prizorgojn: pere de kromaj trompoj li akiras amikojn, kiuj post la maldungo zorgos pri li.

## Jen skize ĉi tiu parabolo.

Demando: Ĉu vere Jesuo ion tian povas esti rakontinta? Ĉu tia trompemulo estu por kristano: kvazaŭ ekzemplo? – Ja estas ne-etike!

Luko, kiu liveras ĉi tiun parabolon, ŝajne ne povis ne uzi ĝin. Ĝi estis transdonita ankaŭ al li, kiel unu el la paraboloj de Jesuo: evangeliisto ja ne elpensas siajn anekdotojn, sed uzas la tradician materialon de la eklezio, al kiu li apartenas. Do, Luko ekkonis ĉi tiun parabolon en la eklezia tradicio – kaj verkante sian

evangelion, li ne povis ne uzi ĝin. Tamen, ankaŭ por Luko, ĝi estis enigma: ĉu ne estas ne-etike, meti iun tian kiel ekzemplon?

Do Luko provas pli-akceptebligi la tuton aldonante ĉenon da saĝaj preskriboj kaj admonoj kaj sentencoj:

"La filoj de ĉi tiu mondo estas pli prudentaj ol la filoj de la lumo",

"Faru amikojn per la maljusta mamono, por ke, kiam ĝi mankos, oni akceptu vin en eternaj loĝejoj",

"Kiu estas fidela en la plej eta afero...", ktp.

## Klarigo-provoj

Tra la jarcentoj oni serĉis klarigojn: por la malbona administranto oni i.a. trovis la jenajn inter si kontraŭdirajn "solvojn": temas pri la judaj gvidantoj, temas pri la impostistoj, temas pri Poncio Pilato, temas pri Satano, eĉ temas pri Jesuo Kristo. Kvazaŭ la nura problemo estus: identigi kiu estas "la malbona administranto"...

## La parabolo mem

Unue ni demandu nin, kio fakte estas la parabolo? Kiuj estas ĝiaj limoj? Luko en la teksto donas tuj sinsekve du klarigojn:

versiklo 8: "tiu sinjoro laŭdis la malbonan administranton, ĉar li prudente agis." kaj en

versiklo 9: "akiri amikojn pere de mono kiel ŝirmon por la eterneco."

Pri la unua klarigo nur eblas konstati: jes, agi prudente estas ... prudente. Pri la dua klarigo ni povas konsenti, ke la komencan eron (fari amikojn) la malbona administranto de nia parabolo celas, sed rilate la duan eron (sin antaŭŝirmi jam pere de mono por la eterneco: ĉu pere de aĉetita indulgenco akiri lokon en la ĉielo?), ni nur povas konstati, ke enhave kaj tendence ĝi absolute fremdas al la tuta parabolo.

Prefere la parabolon ni limigu je versiklo 8a (t.e. tuj post "ĉar li prudente agis"). La cetero estas nura aldonaĵo, devenanta el alia tradicio pri Jesuo, supozeble.

## Kion celas la parabolo?

Mi sincere konfesu, ke mi ne scias. Mi nur povas doni kelkajn eventualajn aplikeblecojn.

Povas temi pri la Eklezio (ne tiu aŭ alia historie difinita denominacio, sed La Eklezio de Jesuo-Kristo, t.e. mondampleksa, ĉiu-epoka). Ja povas vere temi pri la Eklezio. Ĉar, laŭ ortodoksa romkatolika teologio, kaj laŭ same ortodoksa protestanta teologio (ekz-e Karl Barth), la Eklezio estas la Administranto de la Vorto de Dio: Ĝin ĝi vartu, Ĝin ĝi diskonigu al la tuta mondo, Ĝin ĝi igu utila kaj bonfara por la bono de la tuta kreitaro. Sed kion fakte faris la Eklezio pri la Vorto de Dio? Ĉu ĝi ne disipis Ĝin, interkverelante tra la jarmiloj pri dogmoj et-detalaj? Ĉu la Eklezio ne perfidis sian mond-celatan mision, maltrafante la amasojn de la laboristoj, de la junularo, de la feminismo, ktp.? Kaj nun: ĉu sekvos maldungo? Aŭ ĉu la Eklezio ne kviete tion atendos – sed faros kion ajn por plej prudente kaj plej akravide antaŭzorgi ekde nun por trovi solvojn?

Aŭ ĉu ni plilarĝigu la vidon: ni kunprenu Genezon 1:27-31, ĉu? Ni konsideru

– modernesprime – la Homon kiel administranton de la kreitaro. Ni ja scias el la Torao, ke

”La lando apartenas al JHVH.”

– do ni homoj estas ĉe Li gaste. Kaj kion fakte ni faras, ni homoj? Ni disdividas la mondon: jen mia, jen via lando, jen naciismoj, jen bariloj... Kion ni faras? Jen krudaj materialoj bone uzeblaj: ni ekspluatas la grundon, la hom-fortojn prefere de aliaj rasoj; ni polucias – kondiĉe ke ni gajnu monon.

Jen la samaj demandoj: ĉu ĉi tio ne estas disipo? Ĉu nun sekvos mondvasta maldungo de la Homo el lia rolo memelektita? Aŭ ĉu la Homo agos ankoraŭ prudente, por savi – kiel ajn – tion, kio ankoraŭ estas savebla...?

## Amos

En Amos 8:4-7 ni trovas unu el amaso da tekstoj, kiuj formas tutan tavolon en la Biblio: Dio ne forgesas, kiamaniere ni agas maljuste. Precipe kontraŭ niaj kunhomoj.

Ĉu eble ni nuntempuloj kombinu tion ĉi kun Luko 16:19

”faru al vi amikojn pere de la maljusta mamono”?

Tiam la parabolo ricevus la signifon: faru malriĉulojn viaj amikoj pere de via nuntempa riĉo; – ĉu tio identas je ”ne subtenu certajn reĝimojn kiuj subpremas malriĉulojn, neblankulojn, ktp.”? Ĉu la parabolo de la malbona administranto tiamaniere ne povus instigi nin, subteni certan redistribuon de riĉeco ĉie tra la mondo?

Jen, kiel vi vidas: mi ne arogas, ke ĉion mi scias. Mi starigas demandojn. Al vi - kaj al mi mem.

Bibliografio:
The International Critical Commentary: St. Luke / Rev. Alfred Plummer.

## Kelkaj bibliaj rimarkigoj (Gerrit BERVELING, Publikigita en Evangeliaj Kajeroj, 2/1987)

Ofte, rilate al ekologiaj aferoj, oni citas el Gen 1:26 “*Kaj Dio diris: Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero*.” Kaj el ĉi tiu cito, nuntempe oni ellegas, ke ni homoj havas la taskon, bone prizorgi la kreitaron, ke ni devas esti bonaj administrantoj de la kreo de Dio.

Tamen, enestas teksta problemo: la verbo regi, kiun ĉi tie uzis Zamenhof en sia traduko, renkontiĝas en Gen 1 kaj 3 plurfoje: Gen 1:16,18 (pri la suno kaj la luno, kiuj regas la tagon kaj la nokton); Gen 1:26,28 (la homo kiu regas super la kreitaĵo); Gen 3:16 (viro kiu regas super la virino).

En tiuj lokoj temas pri du malsamaj hebreaj vortoj: **משל** kaj **רדה** La unua (maŝal) havas kiel bazan signifon: reprezenti/ esti simbolo, parabolo: ĝin la teksto uzas en Gen 1:16,18 kaj 3:16. La senco de tiuj frazoj do estas, pli malpli, jena: Se oni vidas la sunon, oni sciu ke ĝi reprezentas la tagon; la luno reprezentas la nokton; same, se vi vidas viron, li reprezentas (en la socia vivo tiutempa) la virinon. la dua verbo (rada') havas kiel bazan signifon: piedpremi, distreti. Do tiuj frazoj pli malpli diras la homo piedpremas la fiŝojn, la birdojn, la brutojn kaj ĉiujn ceterajn bestojn.

Por konkludi ĉi tiun etan ekskurson, ni do povas konstati, ke ĝuste la versiklo, kiun oni plej ofte citas el Genezo rilate la ekologian taskon de la homo, ... diras ekzakte la malon! Ĝi ne instigas la homon al zorgoplena uzado de la kreitaro, sed ĝi konstatas, ke ni homoj ĝin distretas…

# Apostoloj kaj iliaj atributoj

## Prezentita dum la ekumena kongreso en Poděbrady 2018

## Oka parto

Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

En tiu ĉi artikol-serio ni parolis pri la dekdu "originaj" apostoloj kaj poste pri Matiaso, kiun la dekunu elektis al la loko de Judaso Iskariota.
Tamen, kiam ni vidas pentraĵojn aŭ skulptaĵojn, ni spertas, ke en la dekdua loko ne Matiaso estas.

Ŝajnas ke la elekto de Matiaso estis rapida kaj homa decido – la apostoloj tuj post la perfido de Judaso Iskariota volis refari la "rondan" dekdu-nombron.
Sed Kristo elektis aliulon sur la vojo al Damasko…

### Paŭlo

Li estis "apostolo de la paganoj", kiu disvastigis kristanismon ekster la judaro.

Paŭlo naskiĝis kiel Saŭlo ĉirkaŭ 10 p.Kr en Tarso, urbo en sudorienta Anatolio. Laŭ kredo, li origine estis judo, apartenanta al la farizea sekto; laŭ klerigado greka; laŭ civitaneco romia. Li persekutis la kristanojn ĝis la jaro 37.

Tiam, vojaĝante al Damasko, li vidis grandan lumon el la ĉielo kaj aŭdis la voĉon de Jesuo (sep jarojn post lia morto sur la kruco) kiu parolis kun li. La lumo blindigis lin provizore, sed malblindigis lin al kristanismo. Dum la jaroj 45–58 li fervore predikis Kriston kaj disvastigis la novan kredon tra la nordorienta Mediteraneo, precipe ĉirkaŭ la Egea Maro.

Dum la jaroj 48 ĝis 63 Paŭlo verkis epistolojn aŭ leterojn al la novaj eklezioj tra la Romia Imperio. La leteroj estas la plej fruaj skribitaj atestoj de kristanismo, eĉ pli fruaj ol la evangelioj, kiuj estis skribitaj dum la jaroj 70 ĝis 100.

Fine, la paŭla kristanismo, pro la granda nombro de nacianoj, fariĝis la kristanismo de la Eklezio kaj, per tio, de la Nova Testamento.

Dum la finaj jaroj (66–67) de sia vivo, Paŭlo laboris por disvastigi la fidon el Romo, kie fine la imperiestro Nerono senkapigis lin en 67.

Pro tio, ke li estis romia civitano, oni senkapigis lin per glavo – pro tio la glavo estas lia atributo.



Parto de poliptiko (1360-1370) de Catarino Veneziano. National Gallery of Slovenia




Jesuskirken, Kopenhago, fino de 19a jarcento



Bartolomeo Montagna, 1582

En la lastaj du partoj de mia longa artikol-serio ni ekkonos la atributojn de la evangelistoj – do ĝis revido en la sekvontaj numeroj de Dia Regno!




Nun, kiam vi vidos pentraĵon, aŭ skulptaĵ-serion, ni rekonos jam la apostolojn, ĉar ni lernis, ke ...



la atributo de
Petro estas
la ŝlosilo

la atributo
de Filipo
estas la
bastono
(kiu ofte
finiĝas per
kruco)





la atributo de
Jakobo la pli
aĝa estas la
migranta,
pilgrimanta
bastono

la atributo
de Paŭlo
estas la
glavo





la atributo de
Bartolomeo
estas la
tranĉilo

la atributo
de Johano
(kiel
apostolo)
estas la
kaliko





la atributo
de Tomaso
estas
mezurlato



la atributo de
Andreo estas
la X-kruco



la atributo de
Jakobo la pli
juna estas la
ilo de pri-
laboristo de
drapo (tipo
de tekstilo)



la atributo
de Simono
estas la
segilo

la atributo de
Mateo estas la
(mon)burso





la atributo
de Tadeo
estas la
halebardo

# 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE)

## en Buĵumburo, Burundo, de 21–27 decembro 2019

Raportis: S-ro Honoré SEBUHORO, DR Kongo.

Estis grava renkontiĝo de kongresanoj el diversaj afrikaj landoj. Estis gravaj, etosaj kaj mojosaj tagoj por ni ĉiuj. Ni plenkreskuloj kaj malpliaĝuloj, esperanto-lertuloj kaj nespertuloj ĝojegis partopreni en tiu ĉi E-Kongreso en Burundio. Gekongresanoj kundancis, kunkantis sen escepto. Iuj el la tagaj agadoj:

- Je la malfermo de la 61-a AMO-seminario. Per tiu ĉi, estis iuj konceptoj (Eksteraj rilatoj, informado, Antaŭ kaj Dum) klarigitaj de Sinjoro Jérémie Nsabiyumva.
- Kiel praktiki fotilon produktante pli belajn fotaĵojn, videojn. Pri tiu ĉi temo: Sinjoro Patrick Manirakiza konsilis kongresanojn kiel praktike uzi aparatojn.
- La kongrestemo: Kiel verdigi nian kontinenton? prezidis S-ro Jérémie Nsabiyumva. Pri tio, venis diversaj opinioj de kongresanoj kiel verdigi nian kontinenton. Jen diversaj jenaj punktoj por plenumi tiun taskon:

**Unue**: Instrui unue nian propran familion esperantlingve (gepatroj kun siaj infanoj). Estas niaj devoj instrui niajn edzinojn kaj infanojn scipovante skribi kaj paroli pli bone E-lingvon.

**Due**: Organizi bone lokajn klubojn kiuj estas la ĉefaj motoroj por amasigi homojn tute lerni esperanton. Ĉi tie, ni devas instigi ne-esperantistajn gejunulojn aliĝi al loka klubo. Plie, ni devas enkonduki esperanton al diversaj lokaj bazlernejoj kaj mezlernejoj. Krom tio, ni devas konigi niajn lokajn landajn asociojn, klubojn, fakajn asociojn. Poste, publike ni devas starigi E-banderolojn, flagojn kaj krei bibliotekojn kie ni devas stoki lernomaterialojn kaj manlibrojn kiel daŭriga legaĵo de klubanoj. Ni ne forgesos enkonduki esperanton en lokaj eklezioj. Interŝanĝante diversajn parolojn per vacapo [WhatsApp] laŭvoĉe por ke la najbaruloj komprenu ke tiu lingvo ekzistas. Per tiu ĉi maniero, ili povos realiĝi al la E-movado. Per radiostacio, ni povos proponi E-elsendaĵojn regule. Krei futbalan sporton inter esperantistoj sed kondiĉe ke oni nur uzas esperanton. Ĉiuj ĉeestantaj ne-esperantistoj povos esti interesitaj aliĝi al loka E-movado.

**Trie**: TEJO. Temo prezidita de fervulo Koffitchè Koufionou, Togolando, kun itala Francesco Maŭrelli. Kiel membriĝi al TEJO, precipe gejunuloj ĉar la juneco estos privilegata estontece.

**Kvare**: Gazetara komuniko. Temo organizita de s-ro Adjevi Adje. Kiel klarigo, ĝi estas mallonga informo kiun oni sendas al gazetoj/informiloj havante klaran bazan fonton. De s-ro Adjevi Adje, ni havis pli bonajn konsilojn kiel verki belsonan gazetaran komunikilon. Tio estas, ke ekzistas diversaj proceduroj por redakti gazetaran komunikilon. La

ĉeestantoj aŭskultis atente skribante ĉiujn konsilojn.

**Kvine**: ILEI-ekzameno. Ni estis klarigitaj ke tiu ĉi proksimiĝo estas gvidata de la ILEI-prezidantino Mireille Grosjean. Tiu ĉi rolas por trejni precipe E-instruistojn en la tuta mondo. Pri tiu ĉi ekzameno iuj volontuloj pli bone profitus. Pluraj esperantistoj aliĝis al tiu ILEI-ekzameno, sed bedaŭrinde multaj malsukcesis. El dudek ses aliĝintoj nur 6 esperantistoj sukcesis kaj ili atingis la duan nivelon « B ».

**Sese**: Sporto. Ni ĉiuj akompanis niajn e-sportistojn kaj burundajn ĵurnalistojn ĝis la ludloko. Tie, niaj eksterlanduloj, Francesco Maŭrelli el Italio, Rakoen Maertens el Britio, Mireille Grosjean el Svislando kaj Koffitchè Koufionou el Togolando ludis serioze por fortigi la teamon. Verdire, estis mojosa kaj etosa tago ĉar ĉiuj ĉeestantoj estis tre aktivaj kantante amo-n, amo-n, amo-n…. Finfine nia E-teamo venkis la ĵurnalistojn el Burundio kun 2 punktoj kontraŭ 1. Dum la ludado de futbalmatĉo, s-ro Honoré Sebuhoro el Norda Kivu/DR Kongo kaj Moses Byamungu el Suda Kivu/DR Kongo iĝis kiel ĵurnalistoj vigligante la ludistojn, filmante ĉiujn taŭgajn aktivaĵojn. Baldaŭ ni lanĉos la filmaĵon pri futbalmatĉo per jutubo.



**Sepe**: Ekskurso: Ni veturis ĝis Mugara, kie ni esploris mirindan varman akvofonton. Loko ofte vizitata de turistoj. La varma rivero estas kuracilo por la homoj. Tiu ĉi estas mirinda loko kaj mistera. Ĉiuj bonvolis esti fotitaj antaŭ kaj apud la varma akvofonto. Komprenu ke tiu ĉi E-Kongreso de la 7-a AKE de Buĵumburo estis valorigita por e-istoj kaj ne-esperantistoj lokaj, ĉar la aŭtoritatoj aprezis Esperanton. Vivu UEA! Vivu AK de UEA! Vivu la LKK de ANEB! ☙

[Rim.: La aranĝo sidejis en la domo de SOS-enfants en la periferia kvartalo Nyakabiga de la ĉefurbo burunda. Ĝin organizis kunlabore la Afrika Komisiono (AK) de UEA kaj la burunda Esperanto-Asocio (ANEB) /red.]



# Dum la Suno dormas

Origine dana artikolo en Jyllands-posten 2009-09-09

De profesoro Henrik SVENSMARK, DK

Elangligis Bengt Olof ÅRADSSON, SE

"Fakte tutmonda varmiĝo ĉesis kaj malvarmiĝo komenciĝas. Neniu klimata modelo antaŭdiris malvarmiĝon de la tero – tute male. Kaj ĉi tio signifas, ke la projekcioj de estonta klimato estas nefidindaj", skribas Henrik Svensmark.

La stelo, kiu vivtenas nin, dum la lastaj jaroj estis preskaŭ libera de sunaj makuloj, kiuj estas la kutimaj signoj de la magneta agado de la suno. La pasinta semajno [4 septembro 2009] la scienca teamo malantaŭ la satelita SOHO (Suna kaj Heliosfera Observatorio) raportis, "Probable la nombro de malplenaj tagoj de la kuranta jaro estos la plej longa en ĉirkaŭ 100 jaroj." Ĉio indikas, ke la suno trafas ian "vintrodormon", kaj la evidenta demando estas, kian signifon tio havas por ni, sur la tero.

Se vi demandas la Interregistaran Spertularon pri Klimata Ŝanĝiĝo (IPCC), kiu reprezentas la nunan konsenton pri klimata ŝanĝiĝo, la respondo estas trankviliga "nenio". Sed historio kaj freŝaj esploroj sugestas, ke probable estas tute erara. Kial? Ni rigardu pli proksime.

Suna agado ĉiam variis. Ĉirkaŭ la jaro 1000, ni havis periodon de tre alta suna agado, kiu koincidis kun la Mezepoka Varma Periodo. Estis tempo, kiam frostoj en majo estis preskaŭ nekonataj – afero tre grava por bona rikolto. Vikingoj ekloĝis en Gronlando kaj esploris la marbordon de Nordameriko. Entute estis bona tempo. Ekzemple, la populacio de Ĉinio duobliĝis en ĉi tiu periodo.

Sed post ĉirkaŭ la jaro 1300, suna agado malpliiĝis kaj la mondo komencis malvarmiĝi. Ĝi estis la komenco de la epizodo, kiun ni nun nomas la Malgranda Glaciepoko. En ĉi tiu malvarma tempo, ĉiuj vikingaj setlejoj en Gronlando malaperis. Svedio surprizis Danlandon marŝante trans la glacion, kaj en Londono la Tamizo ofte ekfrostis. Sed pli gravaj estis la longaj periodoj da rikoltaj malsukcesoj, kiuj rezultis en malbone nutritaj populacioj, reduktis la loĝantaron en Eŭropo je ĉirkaŭ 30 procentoj pro malsano kaj malsato.

Gravas rimarki, ke la Malgranda Glacia Epoko estis tutmonda evento. Ĝi finiĝis je la fino de la 19a jarcento kaj estis sekvata de kreskanta suna agado. Dum la pasintaj 50 jaroj, la suna agado estis la plej alta ekde la mezepoka varmeco de antaŭ 1000 jaroj. Sed nun, ŝajne, la suno denove ŝanĝiĝas, kaj revenos al tio, kion sunaj scienculoj nomas "granda minimumo", tiel, kiel ni vidis en la Malgranda Glaciepoko.

La rilato inter suna agado kaj klimato tra la epokoj estas foje klarigita kiel koincido. Preskaŭ ne gravas kiam vi rigardas, kaj ne nur dum la lastaj 1000 jaroj, tamen ekzistas rilato. Suna agado plurfoje fluktuadis inter alta kaj malalta aktiveco dum la pasintaj 10.000 jaroj. Fakte la suno pasigis ĉirkaŭ 17 procentojn

de tiuj 10.000 jaroj en dorma stato, kiu rezultis en malvarmiĝita tero.

... En 1996 ni malkovris surprizan influon de la suno – ties efiko sur la nuba kovrilo de la tero. Energiaj akcelitaj eroj devenantaj de eksploditaj steloj, la kosmaj radioj, helpas formi nubojn.

Kiam la suno estas aktiva, ĝia magneta kampo pli bone ŝirmas nin kontraŭ la kosmaj radioj venantaj de ekstera spaco. Reguligante la nuban kovron, la suno povas turni la temperaturon supren kaj malsupren. Alta suna agado signifas malpli da nuboj kaj pli varma mondo. Malalta suna agado kaj pli malriĉa protektado kontraŭ kosmaj radioj rezultigas pliigitan nubkovrilon kaj tial malvarmigon. Ĉar la magnetismo de la suno duobliĝis dum la 20a jarcento, ĉi tiu natura meĥanismo eble respondecas pri granda parto de la tiama vidata monda varmiĝo.

Tio ankaŭ klarigas kial plej multaj klimataj sciencistoj provas ignori ĉi tiun eblon, ĉar ne favoras ilian ideon, ke la temperaturo-altiĝo de la 20a jarcento estis ĉefe pro homfaritaj emisioj de CO2. Se la suno kaŭzis gravan parton de varmiĝo en la 20a jarcento, tiam la kontribuo per CO2 nepre devas esti pli malgranda.

De kiam ni aperigis nian teorion en 1996, ĝi estis submetita al tre akraj kritikoj, kio estas normala en scienco.

Unue oni diris, ke ligo inter nuboj kaj suna agado ne povas esti ĝusta, ĉar neniu fizika meĥanismo estis konata. Sed en 2006, post multaj jaroj da laboro, ni finis eksperimentojn ĉe DTU-Spaco, kiuj pruvis la ekziston de fizika meĥanismo. La kosmaj radioj helpas formi aerosolojn, kiuj estas la semoj por la formado de nuboj.

... Ni rigardis la magnetan agadon de la suno kun kreskanta zorgado, ĉar ĝi komencis malpliiĝi meze de la 1990aj jaroj.

Ke la suno povus endormiĝi en profunda minimumo estis sugestita de sunaj sciencistoj en kunveno en Kiruna en Svedio antaŭ du jaroj [2007].

... Fakte tutmonda varmiĝo ĉesis kaj malvarmiĝo komenciĝas. Mojib Latif de la Universitato de Kiel argumentis en la lastatempa Monda Klimata Konferenco de UN en Ĝenevo, ke la malvarmiĝo daŭros tra la sekvaj 10 ĝis 20 jaroj. Lia klarigo estis natura ŝanĝo en la norda atlantika cirkulado, ne en suna agado. Sed negrave kiel vi interpretas ilin, naturaj variaĵoj en klimato revenas.

La rezulto povas esti, ke la suno mem montros sian gravecon por klimato kaj do defios la teoriojn de monda varmiĝo. Neniu klimata modelo antaŭdiris malvarmiĝon de la tero – tute male. Kaj ĉi tio signifas, ke la taksoj de estonta klimato estas nefidindaj.

... Do multmaniere ni staras ĉe vojkruciĝo. La proksima estonteco estos ege interesa. Gravas akcepti, ke Naturo neniel atentas pri kio ni homoj pensas pri ĝi. Ĉu la forceja teorio postvivos signifan malvarmiĝon de la Tero? Ne en ĝia nuna dominanta formo. Bedaŭrinde, morgaŭaj klimataj defioj estos sufiĉe malsamaj ol la forceja teorio. Eble fariĝos denove modo esplori la efikon de la suno sur nian klimaton.

[Profesoro Henrik Svensmark estas direktoro de la Centro por suno-Klimata Esploro ĉe DTU-Spaco.
https://wattsupwiththat.com/2009/09/10/svensmark-global-warming-stopped-and-a-cooling-is-beginning-enjoy-global-warming-while-it-lasts/]

# Tutmonda malvarmiĝo –

## Ĉu tutmonda varmiĝo ankoraŭ okazas?

https://www.skepticalscience.com/global-cooling-basic.htm

Elangligis Bengt Olof Åradsson


Skeptikaj argumentoj emas fokusiĝi al mallarĝaj pecoj de la enigmo dum ili neglektas la pli larĝan bildon. Ekzemple, koncentriĝi pri kelkaj kreskantaj glaĉeroj ignoras la mondan tendencon de akcelado de glacia malpliiĝo. Asertoj pri tutmonda malvarmiĝo malsukcesas ekkoni, ke la planedo entute kaj daŭre amasigas varmon.

Ofte, la kialo de nekredemo je homfarita monda varmiĝo ŝajnas esti politika prefere ol scienca. Ekzemple – “ĉio estas liberala komploto disvastigi socialismon kaj detrui kapitalismon”. Kiel unu homo diris, “la pledantoj por fari ion kontraŭ monda varmiĝo ŝajnas plejparte esti la pledantoj por multaj celoj/aspiroj, pri kiuj mi malaprobas”. Tamen, tio, kio kaŭzas tutmondan varmiĝon, estas nura scienca demando.

Kiam ni serĉas pruvojn pri tutmonda varmiĝo, troviĝas multaj diversaj indikiloj, kiujn ni devas esplori. Kvankam estas nature komenci per temperaturoj de aero, pli profunda ekzameno devas esti kiel eble plej inkluziva; neĝa kovrilo, glacia fandiĝo, aeraj temperaturoj super tero kaj maro, eĉ la maraj temperaturoj mem. La ĉefaj indikiloj de tutmonda varmiĝo estas tiuj, kiuj montras en la direkto supozata lige al varmiĝanta terglobo.

La demando pri ĉesigo de tutmonda varmiĝo ofte leviĝas sekve de lastatempa vetero-evento – granda neĝado aŭ sekec-rompa pluvo. Tutmonda varmiĝo tute kongruas kun ĉi tiuj eventoj; finfine ĉio estas nur vetero. Por klimata ŝanĝo, kontraste, gravas la longtempaj tendencoj; mezuritaj dum jardekoj aŭ eĉ pli, kaj tiuj longtempaj tendencoj montras, ke, bedaŭrinde la terglobo ankoraŭ varmiĝas.

ଔ




Indikiloj de varma mondo bazita sur surfaco, satelito kaj oceana temperatura mezuradoj, satelitaj mezuradoj de energia malekvilibro (la diferenco inter envenanta kaj eliranta energio ĉe la supro de la atmosfero), kaj de bremsantaj glaciaĵoj, mara glacio, kaj glaciaĵoj, altiĝantaj marnivelo, kaj ŝanĝiĝantaj sezonoj.

# Antropoceno

## Geologia epoko

Ĉerpita kaj tradukita el Vikipedio

Se antropoceno estos science akceptita kiel geologia epoko, ĝi sekvos la nunan holocenon. La vorton antropoceno eblas traduki per “la epoko de homo” post la greka *antropo-*, kiu signifas homon kaj *-cen*, kiu signifas novan.

### Difino kaj koncepto-historio


Antropoceno estis proponita en la jaro 2000 de la Nobel-laŭreato kaj atmosfera kemiisto Paul Crutzen, kiu vidas la homan efikon sur la teran medion tiel signifa, ke ĝi pravigas la enkondukon de nova geologia epoko.

La itala geologo Antonio Stoppani sugestis jam en 1873, ke la influo de la homo sur la naturon komencis novan geologian epokon, kiun li nomis la Antropozoiko. La propono de Stoppani estis ignorata kaj konsiderata esti ne-scienca laŭ liaj samtempuloj; li estis tro frua rilate sia tempo.

Paleoklimatologo William Ruddiman de la Universitato de Virginio opinias, ke la antropoceno ne komenciĝis komence de la industriigo. Li volas ĝin ekfunkciigi antaŭ ĉirkaŭ 8.000 jaroj, kiam la unuaj farmistoj hakis grandajn arbarojn por akiri kampojn por siaj kultivaĵoj.

### Indikoj pri epokŝanĝo

La esploristoj, kiuj laboris pri la koncepto de antropoceno, montras al kelkaj mediaj efikoj de la homa agado. Surbaze de mezuradoj de glaciaj kernoj, oni trovis pliigitajn nivelojn de la gasoj karbondioksido kaj metano ekde la mezo de la 1900-aj jaroj. Nukleaj eksplodoj de 1945 ankaŭ lasis klarajn spurojn en la geologiaj tavoloj. Plue, urbanizado kaj ĉiam pli intensigita terkultivado kaŭzis pliigitan erozion kaj transportadon de sedimentoj. La koncentriĝoj de karbono, nitrogeno, fosforo kaj metaloj en la atmosfero, oceanoj kaj la surfaco de la tero ankaŭ ŝanĝiĝis. Por bestaj kaj plantaj vivoj, homa ĉeesto rezultis en perdo de vivejo, estingo de multnombraj specioj kaj enkonduko de invadaj specioj.



Ĝis nun la nuntempo de homaro estis priskribita kiel parto de la holoceno, la tempo post la lasta glaciepoko. La antropoceno eble estos aldonita kiel posta geologia epoko.

# La ekologia futuro dependas de ni

Koncerno: Letero de Albrecht Kronenberger al la redakcio, Dia Regno 3/2019 [sube]

Jes, devas esti klimatoŝanĝiĝo kaj terplivarmiĝo, ĉar la tero pro si mem ne povas ŝanĝi aŭ plivarmiĝi (vidu la dokumentojn de Asocio de Verduloj Esperantistaj [AVE], www.verduloj.org).

Kaj jes ja, la Planedo mem pro siaj sistemaj kaj materiaj strukturo/dinamiko varie sin influas en la senco de ŝanĝiĝo. Tamen oni ne trompiĝu: La aktuala ekologia stato de la biosfero estas laŭ la superrega plimulto de sciencaj ekkonoj mezureble homfarita kaj kriziga. Ĉi konstato estis la bazo de la Klimatokonvencio de Parizo (2015). Kaj ĝi ĉefe rilatas al la CO2-emisioj de homaj individuoj kaj kolektivoj. Laŭ esploroj de la t.n. postkreska ekonomio (vidu interrete: Niko Paech, Postwachstumsökonomie) ĉiu unuopulo de nia unu komuna Planedo aktuale rajtas emisii ĉiujare 2,5 tunojn da CO2 sen pligravigi la situacion. Fakte ekz. en Germanio la emisio pokape sumiĝas je la kvaroblo de ĉi kvanto. Por haltigi la daŭran malpliboniĝadon de la ekologia stato de nia Planedo estas tri rimedoj, kiuj ĉiuj rilatas al homa agado: *reduktado, kompensado, adaptado*. Reduktado en la senco de malaltigo de la konsumo, t.e. de intervenoj en la materiajn kaj sistemajn resursojn. Kompensado en la senco de kontraŭpezi neeviteblajn intervenojn. Kaj adaptado en la senco de efektivigo de preventivaj paŝoj kie kaj kiam ajn eblas.

*Wolfgang Guenther*
(UEA, AVE, Nula Horo)
w.guenther.esperanto@web.de
Kassel, Germanio

## Letero de Albrecht Kronenberger al la redakcio [DR 3/2019]

Oni ofte parolas pri klimato-ŝanĝo kaj ter-plivarmigo. Laŭ mi oni parolu pli trafe pri klimato-ŝanĝiĝo kaj ter-plivarmiĝo, Ĉar la homa kontribuo ŝajnas al mi bagatela kompare kun ekz. vulkan-erupcioj aŭ terglob-aksa migrado. Glaci-epokoj kaj varm-epokoj okazis sen homa farado. Ke Germanujo estis kovrita portempe per glaĉeroj kaj en aliaj tempoj per tropikaj praarbaroj, tion tute certe ne kaŭzis homoj.

Pli necese estus plani konkretajn paŝojn por pluvivi malgraŭ la ter-plivarmiĝo, ekz.:

- organizi la nutradon de tiuj homoj, kies regionoj stepiĝas aŭ dezertiĝas,
- serĉi jam nun lokojn sekurajn por la loĝantoj de tiuj urboj, kiuj baldaŭ estos inunditaj,
- veki la pretecon por dividi sian propran vivo-terenon kun aliaj homoj, kies vivo-tereno malaperas.

Tamen, memkompreneble, ni protektu nian medion, por ke ni kaj niaj posteuloj ankaŭ estonte havu freŝan aeron kaj puran akvon. Sed ni ne pensu, ke ni per tio povus haltigi la klimato-ŝanĝiĝon.

# *Estimata Sinjoro Åradsson,*

**Music Editions**
**by Christoph Dalitz**

freŝdate mi muzikigis du diservajn tekstojn en Esperanton. Mi skribas al vi, ĉar tio eble interesas la legantaron de 'Dia Regno'. Mi disvastigas la verkojn sur mia retpaĝo senpage je la permesilo CC-BY-SA.

## 1) La mesordinariumo (sen la 'Credo')


Mi uzis nur du voĉojn kaj akompanon de ia akordmuzikilo, por ke la muziko estu kantata eĉ, se nur malmultaj kantistoj estas disponeblaj.

Jen la muziknotoj: http://music.dalitio.de/choir/dalitz/missa-esperanto-a2/

Kaj jen registrado (kantata de mi mem kaj mia edzino): https://www.youtube.com/playlist?List= PLLSuctRWuI9tLhP3qeXWs7HuwAl5KrB51

## 2) La Aarona Beno

Estas verkita je tri voĉoj, sed la komponaĵo estas tiom facila, ke ĝi estas kantebla senpene de kunvenintoj je variaj okazoj.




Jen la muziknotoj: http://music.dalitio.de/choir/dalitz/aarona-benu/


Jen registrado (je egalaj voĉoj): https://youtu.be/xBBrjcMdIIc

*Kun afablaj salutoj por la nova jaro, Christoph Dalitz*

Rim: serĉu surrete per la vortoj "Kyrie en internacia lingvo dalitz" aŭ "aarona beno dalitz" aŭ trovi je la paĝaro http://music.dalitio.de/ /redaktoro

# Dankon, Di', pro la pano

(originale verkita en Esperanto)




DANKON, DI', PRO LA PANO • M kaj E (originale verkita):
Albrecht Kronenberger 2019-08-27




## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

**5. aprilo**

*Kompatema Patro, mi petas pro la spirito de la humileco. Gardu min kontraŭ ne-toleremo, malmoleco kaj fierego. Helpu min uzi mian forton por porti la krucon de mia proksimulo.*

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de J. Tuinder.

# Júlia Sigmond
# 11.07.1929 — 23.03.2020

Júlia Sigmond forpasis la 23an de marto 2020 en hospitalo de Piacenza (Italio) en sia 91a vivojaro. Ŝi estis rumania hungara pupaktorino kaj esperantistino (ekde 1956). Ŝi kunlaboris en Monato, dum 12 jaroj redaktis la revuon Bazaro (1997-2009), ricevis kelkajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA kaj verkis pli ol dek librojn en Esperanto: Mi ne estas Mona Lisa (2001), Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo? (2008), Novaj fabeloj pri Ursido Pu kaj Porketo (K-disko, 2008), Nomoj kaj sortoj (2011), Dialogo (2012), Libazar' kaj Tero (kun Sen Rodin, 2013), Kvodlibeto (kun Sen Rodin, 2015), Kvin geamikoj (2016), Fronto aŭ dorso (2017), Doloro (2017), Steĉjo-Fabeloj (2018), Dankon (2018), Júlia Sigmond 90 (2019).



Ni funebras pro la forpaso de Júlia, abonanto de La Ondo de Esperanto en kiu aperis recenzoj de ŝiaj verkoj, kaj kondolencas al ŝia edzo Filippo Franceschi (Sen Rodin), kiu nun estas en hospitalo.

*Halina Gorecka,*
*Aleksander Korĵenkov*

Ĉi tiu artikolo aperis en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto.
La Ondo de Esperanto https://sezonoj.ru/2020/03/nekrologo-44

La 27an de marto, en la sama hospitalo pro la sama malsano, Kovim-19, forpasis la edzo Filippo Franceschi, plej bone konata per la pseŭdonimo Sen Rodin.

Li junaĝe lernis Esperanton en sia naskiĝurbo, Padova, de la onklino Mirzia Marchesi, la tradukinto de La aventuroj de Pinokjo.


Post emeritiĝo li translokiĝis en etan vilaĝon en la Apeninoj apud Piacenza kaj tien translokiĝis Júlia post ilia geedziĝo.

Nun ili kune lasis nin ĉiuj fizike, ilia memoro kaj iliaj verkoj daŭre estos kun ni.

*Michela Lipari*
Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio
Laŭ mesaĝo al rondletero al UEA-membroj

# Dankon, Di', al Vi

(originale verkita en Esperanto)




2. Kion ajn alportos la ontaj horoj,
    zorgojn, penojn, plagojn, defiojn, taskojn:
    ĉion mi akceptu el Viaj manoj, / mavon kaj bonon.

3. Vi nur ĉiam staru ĉe mia flanko.
    Kasko Vi al mi, ŝildo kaj kiraso!
    Vi paŝtiste gardu min kaj protektu. / Volu min beni.

4. Estu glor' al Vi, estiganta Patro;
    estu glor' al Vi, ho savanta Filo;
    sama glor' al Vi, ho Spirit' de l' amo; / nun kaj eterne.

DANKON, DI', AL VI • M (Sapfa Strofo 1): Albrecht Kronenberger antaŭ 1980 • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2019-08-11